# HEJS

BULTENO DE

# HISPANA ESPERANTO ★ JUNULARA SEKCIO

**Nro. 34**
**Januaro - Februaro 1964**

**REDAKTORO: Sro. S. ARAGAY**
POŜTKESTO 26
Arce, 8, 2.º, 4.ª - CORNELLA (Barcelono) Hispanujo



*Kunveno de HEJS-estraro en la nova junulara kilubejo.*

# H. E. J. S. - E S T R A R A  K U N V E N O

## LA 12-an DE JANUARO EN LA NOVA SIDEJO DE HEJE EN BARCELONO

La foto de la koverto montras la HEJS-estraron dum la unua kunveno de ĉijare. Kiel konstatos la leganto estas - la unua fojo ke ĉiuj estraranoj senekcepte, partoprenis - en la kunveno, tio montras klare kaj precize iliajn interesojn por la disvastigado de Esperanto kaj por scii kaj sciigi las lastajn informojn de TEJO kaj aliajn eksterlandajn aferojn.

Post 3 laboraj horoj oni aprobis 16 punktojn. Sube ni indikas tiujn kiuj rilatiĝas al la membroj.

a) Eldoni informvarbilon de HEJS kaj peti ĉiuj membroj ilian kunlaboron en la varbado de novaj membroj.

b) Atingi pliajn 100 membrojn dum la L-a HEJS-laborplano (ĝi finas la lasta tago de 1966-a)

c) Eldoni glumarkojn kun la insigno de HEJS.

d) Doni ĉiuj HEJS-membroj proprajn menbrokartojn

e) Eldoni etajn membrokartojn kaj kuponojn, por klarigi la pagon de la kotizoj.

f) Ciu Klubo de HEJS (momente nur funkcias tiu de Barcelono) havos specialajn kotizojn:
Monate. 10 ptoj, rajtas ricevi nur la HEJS-bultenon.
Monate 15 ptoj, rajtas ricevi la Bultenon de - la Federacio kaj HEJS-bultenon.
La duaj kotizoj rajtas ankaŭ; membrokarton, kaj aliajn informojn de HEJS.
Ĉiu Klubo de HEJS, pagos al la kasisto de HEJS je la fino de ĉiujare po la membroj kiuj ĝi havas

g) HEJS pagos al TEJO la aprobitan ciferon po ĉiu membro kiu samtempe ne aliĝas al HEF

h) Akcepti la peton de nia HEJS-Delegito en Madrido s-ro Gonzalo Herrero per kiu li reprezentos HEJS okaze la estonta 20-a Internacia Junulara Kongreso de T.E,J.O. en AMSTERDAM

I) Organizi pliajn HEJS-Klubojn kie ekzistas HEJS-rondoj, laŭ la cirkonstacoj kaj eblecoj(Tiel do se iu HEJS-Delegito deziras agi en tiu senco - bonvolu peti klarigojn al la HEJS-prezidanto.)

EKSKURSA FAKO

Pasintaj ekskursoj de HEJS-klubo en Barcelono

Tago 26 de januaro.

Ekskurso tra S. Pere Sacama, Puig Ventos, S. Salvador de les Espases, Montserrat.

Partoprenis: Josefina Girona, Magencia Garcia, Teresa Girona, María Peris Mª Dolores Bordanoba, Teresa Illana kaj Jordi Gumá, José Castro, S. Aragay.

_ _ _ _ _ _ _ _ _

Tago 9 de februaro

Ekskurso tra la monto Cingles de Berti. Vojplano: Aiguafreda, Cingles de Berti, Kastelo de Centellas, Aiguafreda.

Partoprenis: Amparo Garcia, Mª Riera Palomar, Mercedes Val, Silvia Llorca, Josefina Girona kaj Jose Castro, Rosendo Puig Eusebio Via, Angel Lastras, Antonio Conesa, Santi Pedesoles, Alvarez Quintero, Salvador Aragay, Ramon Jover.

_ _ _ _ _ _ _

Tago 23 de Februaro

Ekskurso al Tagamanent. Vojplano: Figaró, Tagamanent, Canoves, Garriga.

Partoprenis: Magencia Garcia, Teresa Illana, Josefina Girona kaj José Castro, Salvador Aragay, Anto-

nio Mendes, Jose Peig, Rosendo Puig, Luis Cuervo.

- - - - - - - - -

Estonta ekskurso HEJS-klubo en Barcelono organizas ekskurson tra la montaro Montseny kaj Guillerias la tagoj 27-28-29-30 de marto, en ĝi okazos konferencoj, oratora konkurso, amuzaĵoj, sportaj ludoj ktp. Aliĝu al la ekskurso kiel eble plej baldaŭ

-o-o-o-o-o-o-

Tago 5 de januaro

Grupeto de gesamideanoj el Manresa ekskursis al la monto "Coll Baix". Tie ili vizitis la "raŭfon" (1) starigita supre de tiu monto okaze de kristnasko.

Post surmeti delikatan diantbukedon laĉigita de ŝil ka rubando kie estis legebla la vorto ESPERANTO, niaj samidaanoj subskribis en la viztlibro, laŭ la sekvanta ordo. F-inoj. A. Boch. M. Lourdes. S-roj. M. Sabria. D. Muñoz - R. Aynes kaj R. Sala.

(1) Germane, Weinachtskrippe; Angle, Little Crib; France, La Sante Cribe; Hispane, Belen.

-o-o-o-o-o-o-o

20-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE T.E.J.O.

A M S T E R D A M 8-15 aŭgusto 1964

SEKR. Kastelenstraat 231. AMSTERDAM

KAS. Vermeerstr. 7 , ZAANDAM, poŝtĉekkonto 686965

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

La 20-a I.J.K.fakte okazos en du medio: la dumtaga programo okazos plejparte en Amsterdam kaj en la konata Anne Frank Domo, sed dumnokte la litoj kaj aliaj allogaĵoj de la junulargastejo en antaŭ-urba vilaĝo "Broek" - atendos la kongresanoj. Tiel ono kombinos la grandurbajn plezurojn kun la kampara sereno.

El Den Haag (Hago,urbo de la 49-a U.K.) speciala aŭtobuso veturigos la gejunuloj al Amsterdam je reduktita tarifo. Aliaj venante vagonare aŭ sur privataj radoj, tro-

vos akceptantojn en la Centra Stacidomo.

La Loka Kongresa Komitato, speciale bonvenigas kapablulojn en kant (ig)a, oratora, danca, kabareda, muzika, teatra kaj aliaj amuzigaj fakoj.. Ili bonvolu averti la L.K.K.-on pri siaj eblaj partoprenoj en la programo jam antaŭ la 1-a de marto. Tiu sinanonco ne devas esti jam definitiva, sed informos nin pri la proksima amplekso de via partopreno.

Protektanto : Prof-ro. J. Kok, Rektoro de la Universitato de Amsterdam

Honora Komitato: Ok eminentuloj konsistigas la Honoran Komitaton.

Kotizoj : inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj programon.

| | | | |
|---|---|---|---|
| malpli ol 20-jaraj | $ | 20 | ĝis 1 aprilo |
| pli aĝaj | $ | 22 | ĝis 1 aprilo |

Limdatoj: Aliĝo estas ebla ĝis maksimuma partopreno de 110 personoj, kaj ĝis la dato 15-a de julio 1964-a.

En la junulargastejon LITTUKA SAKO aŭ du littukoj kun kusenkovrilo devas esti kunportitaj de la partoprenatoj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

Ĝis nun 5 junulinoj de HEJS-klubo en Barcelono kaj Gonzalo Herrero, prezidanto de la Madrida-Delegacio de - HEJS partoprenos la 20-an I.J.K.)n. HEJS-geanoj partoprenu amase al la menciita kongreso. Petu informojn rekte - s-ro S. Aragay. str. Arce 8-2-4 Cornella

-o-o-o-o-o-o-o-o-

## K A R U S E L V O J A Ĝ O

Kio estas Karuselvojaĝo ? Karuselvojaĝo estas tute nova sistemo de vojaĝo speciale por esperantistoj.

Prenu la geografian karton de Nederlando, Germanujo, Luksemburgo kaj Belgujo, Faru linion inter la urboj Amsterdam, Koln, Heidelberg, Luxembourg, Bruxelles kaj Amsterdam. Vi nun havas cirklon de vojo, kiun vi povas veturi per aŭtobuso. La esperantistoj, kiuj eksidas en la -

aŭtobuso en Amsterdam faras la rondon ĝis Amsterdam.

Por ili, la vojaĝo finiĝas en Amsterdam, La vojaĝo tamen ne estas aranĝita nur por Amsterdamanoj. Ĉar la aŭtobuso daŭrigas sian vojon kaj faras sinsekve ses rondoj, aliaj esperantistoj, kiuj ekzemple dumvoje en Koln, Heidelberg. Luxembourg aŭ Bruxelles aliĝas, restas en la aŭtobuso. Dum la posta rondo ili vojaĝas ĝis la loko, kie ili komencis la vojaĝon. Ĉar la aŭtobuson faras ripetiĝantan rondvojaĝon, ĝi ricevis la nomon karuselvojaĝo.

Kiuj estas la avantaĝoj?.

a. Esperantistoj, kiuj ne povas partopreni internacian kongreson tamen povas esti en Esperantujo.

b. la vojaĝkosto ne estas influataj de reklamkostoj, ĉar la reklamado okazas pere de propaj revuoj, gazetaj kaj cirkuleroj.

c. ĉar la partoprenantoj vizitas regule samajn hotelojn restoraciojn, vidindaĵojn, suvenir-vendejojn ktp. oni povas postuli la aplikon de Esperanto.

d. La esperantistoj en urboj, kie ni tranoktas aŭ restadas povas utiligi la viziton por siaj membroj.

e. La vojaĝo kontribuas al la efektivigo de la internacia unueco, pri kiu la aŭtoritatuloj kaj diplomatoj konstante alvokas.

f. Esperanto manifestas sian nerefuteblan taŭgecon al la ĝenerala publiko.

Partoprenante ĉi tiun vojaĝon vi do profitas ekonomie.vi praktikas Esperanton kun eksterlandaj samideanoj, vi propagandas Esperanton kaj dum la tuta vojaĝo vi estas en vera internacia rondo familia.

Partoprenontoj petu informojn rekte al I.T.C. gebouw 114 SCHIPHOL. Nederlando.

-o-o-o-o-o-o-

## MEZSOMERA RENKONTIĜO EN SVEDUJO

La Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU) aranĝos sian mezsomeran renkontiĝon, tiu ĉi jaro en Sundsvall,ur

bo ĉe la marbordo en la mezo de Svedio (400 kilometroj nordo de Stockholmo.) Nun ni invitas eksterlandaj esperantistaj gejunuloj ĝui kun ni la grandan svedan mezsomerfeston kaj sperti la plej hela "nokto" de la jaro. La renkontiĝo oficiale daŭros 19 ĝis 21 de junio, sed estos eble por tiuj kiu kiuj tion deziras resti pli longe kaj malmultekoste. Ekskursoj aranĝos laŭ intereso. Unu reprezentanto de ĉiu lando restos senkoste. Permesu al vi mem la ĝojon sperti la tradician mezsomeron en Svedujo en amika rondo.

Ĝis revido en Sundsvall deziras Ingrid Carlsson, vic - sekretario de SEJU.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

Tiel do se iu HEJS-geano deziras partopreni la menciitan aranĝon skribu kiel eble plej rapide al la Redakcio de HEJS. Kiel bone indikas F-ino Ingrid Carlsson unu reprezentanto ne devas pagi la restadon en la renkontiĝo, tial estas tre interesa trovi reprezentanton de HEJS por la mezsomera - renkontiĝo en Svedujo.

HEJS-estraranoj kaj delegitoj, studu viajn eblecojn

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

KORESPONDA FAKO

Gvidas S-ro. Francisco Parareda. str.S. Pedro 23 Moyá

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Deziras interŝanĝi poŝtkartoj kaj korespondi pri popolkostumoj.

19-jara. Jamuar Motkiewiez. Kwiatowa 5, Woj. Ziel.Gora. Pollando

samideano. Valerio Capell. grupo Prco.Cots.P8,P80 Manresa (B) Hispanujo

F-lo. Francisco Parareda, str. Illadigna 5-4-1 Sabadell (B) Hispanujo

---

Ankaŭ petas korespondadon kun esperantistoj de angla lingvo 27-jara samideano.li korespondos pri ĉiuj aferoj t.e: geografio, filatelio, poŝtkartoj kaj poŝtmarkojn ktp.

S-ro José Luis Ormijana de Neira . str. Filipinas 2-2
Villafranca de Oria (Guipúzcua) Hispanujo.

16-jara komencantino serĉas korespondamikoj (16-25-j).
F-ino. Sirpa Neuvonen. Torsansalo, Laikko. Finnlando

-o-o-o-o-o-o-o-o-

## DUM TRI JAROJ SINSEKVAJ, ESPERANTISTOJ VENKIS EN FOTAJ KONKURSOJ

Post brila fota konkurso, la 3-an organizita por Lingua Club Manresa la 25-an de januaro kun ĉeesto de la urba konsilantaro pri kulturaj aferoj kaj la prezidanto de Lingua Club okazis la disdonadoj de premioj.

Niaj samideanoj Sro. Ramón Aynes, ricevis la unuan premion kaj S-ro M. Sabríá la duan premion.

-o-o-o-o-o-o-

## INFORMOJ PRI LA ESPERANTA MOVADO

Dum la antaŭa tago. 19-an de Januaro oni inaŭguris novan Esperantan grupon en la kvartalo de Can Cartro(Saborats) Prelegis pastro Jose Claramunt, Poste, Pf-ro. Manuel Nus komencigis kurson, partoprenante pli malpli 28 gelernantoj.

-o-o-o-o-o-o-

## 6-a BARCELONA PROVINCA ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN VILLANUEVA Y GELTRU 26-a de APRILO

Kiel ĉiujare la barcelonaj esperantistoj renkontiĝis, eble imagis iuj ke iufoje mankos al la barcelonanoj urboj, tamen ne okazas tiel, danke al la lerta kaj saĝa agado de nia kara pastro José Claramunt, jam nun, ni povas informi al vi ke la venonta renkontiĝo okazos en la mirinda urbo Villanueva y Geltrú, dum la lasta dimanĉo de aprilo.

Post longa diskutado de la K.E.K. oni akordis organizi similajn aranĝojn ol la antaŭa renkontiĝo, t.e. Santa Meso, Vizito al la urbestraro. Konferenco, Banquedo, kaj

unu novaĵo " ESPERANTISTA FORUMO " poste de la bankedo. Tiel do ni petas al ĉiuj niaj legantoj bonvolu studu - siajn eblecojn, partopreni la E-Forumon.

Kompreneble ni atendas vin, Junuloj pripensu kian temon vi parolos okaze de la renkontiĝo en Villanueva y Geltrú

-o-o-o-o-o-o-o-

FILATELIA FAKO.- pli ol 2000 uzitajn poŝtmarkojn jam ricevis la gvidantino de tiu ĉi posteno. Sendu amase viajn uzitajn poŝtmarkojn al F-ino Amparo Garcia. Str. San Ramón 25-4-1. Barcelono (1). Ni atentigas vin ke 6 geanoj de HEJS partoprenos la I.J. Kongreson de TEJO en Amsterdamo Tiel do ili persone donos al U.E.A. niajn uzitajn poŝtmarkojn. Sendu ĝis la monato Julio ilin.

-o-o-o-o-o-o-o

## BONVENON AL LA NOVA REVUO DE TEJO (KONTAKTO)

Laŭ peto de nia azia kunlaboranto S-ro Armand Su, ni plenumas lian peton, publikigante artikolon, lian, aperita en la revuo "Esperanto" en kataluña lingvo.

-o-o-o-o-o-o-o-

Amb joia vaig llegir en el nº 15 de HEROLDO que la comissió de TEJO durant la seva reunió, va decidir crear una nova revista en Esperanto, sobre temes mundials jovenils. De tot cor em congratulo d'aquesta determinació i prometo el meu esforç per la cistal-lització i continuitat d'aquesta revista.

D'anys ença nosaltres, joves esperantistes, hem estat sospirant inútilment per una revista en Esperanto. Tot i que ja existeixen algunes revistes jovenils internacionals i amb alguns articles en Esperanto, no teniem els joves esperantistes la revista que desitjaven. Aquestes revistes son: "Radar", "World Student News", "Vorld Youth", etc. També el nostre propi òrgan "La Juna Vivo" no acontentaben als nostres lectors, ¿per què estàn limitades a la publicació d'informes, per falta d'espai o de material?

Abans, "La juna Vivo" era una revista apart, però quan en ella es feia una pàgina, a vegades mitja, en "Esperanto" de U.E.A. , el seu contingut no variava gaire. D'aquesta manera, el nostre anhel per una nova revista jovenil totalment en Esperanto dia a dia augmentava. Finalment la decició de TEJO realitzarà el nostre desig i el d'altres joves del món. De tot cor, felicitats!.

Jo proposo que la revista sigui de contingut dens i millor si pot ésser il-lustrada. En ella hi haurien d'haver seccions de: poessia, art, música, ciència, costums, d'humor, etc. Que sigui redactada per els joves mateixos i s'hi insertin principalment articles originals, encara que també traduccions per estimular als nostres joves escriptors a la col-laboració. Hauria d'haver-hi lliure discussió sobre la vida, amor i tota clase de problemes dels joves lectors.

Important: Haurien de premiar-se els millors artícles. Fínalment la revista hauria d'organitzar concursos i tenir constant col-laboració d'esperantistas de tot el món.

Amb aquesta interessant revista, nosaltres no solament farem bona propaganda per Esperanto sino que servirá per donar a coneixer a molts no esperantistes la nostra causa, i augmentar les nostres files.

Tradukis. Magencia Garcia.

-o-o-o-o-o-o-o-

ATENTU HEJS- geanoj.- Jarabono al la revista KONTAKTO NUR KOSTAS 128 PESETOJ. sendu viajn abonojn rekte al la kasisto s-ro R. Jovani Pasaje Pujós 16-19 Hospitalet (Barcelono)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

BILANCO JARO 1963

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj: | Saldo 1962 ............. | 275 ptoj. |
| | kotizoj ................ | 7.557 " |
| | Fondaĵo I.R. (Anoncoj k. donacoj)... | 1.125 |
| | | 8.957 ptoj. |

Elspezoj:

| | | |
|---|---|---|
| Bulteno ................. | 4.600 | ptoj. |
| informado ................ | 211 | " |
| Pago H.E.F. ............... | 1.810 | " |
| Pago T.E.J.O. ............ | 160 | " |
| Korespondado ............ | 1.000 | " |
| 2-a H.E.J.S.- Kongreso... | 1.000 | " |
| | 8.781 | ptoj |

Favora Saldo ....... 176 ptoj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## NOTAS DE SECRETARIA

### Socios que han efectuado el pago de la cotización anual.

Srtas. Mª Teresa Magriá, Matilde Magriá, Paquita Ireguas, Ingrid Carlons, Diana Puig, Elsa Baez, y Srs. Rafael Mª Corrales, Jaime Aragay, Juan Vélez, Ricardo Senís, Carlos Sains, Fernando Gutierrez, Gonzalo Herrero, Pedro Nuez, - Oscar Puig, Hector Puig, Felipe López, Juan Azcuenaga, Ramón Jovani y los grupos esperantistas de Bilbao y Villafranca de Oria.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

La Junta ruega a todos los HEJS-delegados y socios en general que, envien sus cotizaciones directamente al Sr. Cajero. Ramón Jovani. Pasaje Pujós 16-19 Hospitalet(Barcelono) enviarlas a otros miembros de la junta equivale causar problemas en general.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

Como en el año anterior la HEJS- junta organizará una próxima reunión juvenil en el próximo kongreso Español de Esperantistas en Valencia, asimismo el 2º Concurso de Oratoria Juvenil.

Se ruega a nuestros asociados que asistirán al 25 Kongreso Esperantista en Valencia nos informen detalladamente si desean representar a su grupo o ciudad durante la obertura del 3º Congreso Juvenil y si desean participar en el mencionado Concurso de Oratoria.

A igual del pasado concurso, se indicará en el próximo boletín los temas elegidos.

C

MADERAS
CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24
BARCELONA (14)

jovani

instalación
restauración
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares, billarines, etc.

instalación sin ningún gasto para el cliente

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA
y
TEJEDORA
ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos
Tel. 230 29 41
BARCELONA

ELDONEJO
KOKO

Randbølvej 4
Kopenhago - F
DANLANDO

"La Marvirineto".
*27 x 21 cm. bindita*
*75 paĝoj. Prezo: 30 steloj*